

SANO

JARKOLEKTO 1988

NUMERO 4

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Medicinstaj informoj - SANO – jarkolekto 1988 – numero 04 - Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, geflegistoj kaj ruĝkrucanoj.

Eldonas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, medicina sekcio, Jilská 10, Praha 1 – kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto Starto

Redaktas: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště 718, ĈSSR
Grafika kunlaboranto : Jiří Hanousek, Liberec

Presas: RUCH LIBEREC, ÚVTEI 85 027

KIAMANIERE ABONI NIAN CIRKULERON ?

La jarabono estas 10,50 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro. Se vi ne povas aboni ĉe perantoj sube notitaj, skribu al ni. Vi povas mendi ankaŭ asocian gazeton STARTO, ĝian kulturalan almanakon PANORAMO, diversajn niajn librojn, insignojn, glumarkojn kaj aliajn esperantaĵojn. Abonprezo en ĈSSR 24 Kčs, en socialismaj landoj egalvaloro de 36 Kčs.

PERANTOJ:

BULGARIO: Stojĉo CANKOV, p.k. 208, BG-7000 RUSE

ĈSSR: ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, Jilská 10, 110 00 PRAHA

G D R : Margit Volkmann, Gubenstrasse 19, Zittaŭ, DDR-88

HUNGARIO: D-rino ISTVANE GAJZAGO, Karolyi Mihaly u. 41/B, 1053 BUDAPEST

JAPANIO : Saburo YAMAZOE, 371 Maebashi-shi, Iwagami-Machi 4/8/9 GUNNA-KEN

POLLANDO: STEFANIA WOJCIECHOWSKA, ul. Demokracji 10/10, PL-78-320
POLCZYN ZDROJ

SOVETUNIO: N. SIGAJEV, Posadskaja 18-3, SU-450014 UFA

UEA : UNIVERSALA ESPERANTO_ASOCIO. Nieuwe Binenweg 179, BJ 3015 ROTTERDAM,
NEDERLANDO

USA : BERN VHEEL, BOOKS, 834 WENOAH, Oak park, IL 60304

ĤEMIIZO DE LA VIVOMEDIO KAJ LA HOMA SANO II

CELULOZO KAJ HELPAJ ĤEMIAĴOJ

Ing. Zdeněk Pluhař

1. Celulozo rilate la vivomedion

Celulozo estas natura makromolekula substanco, t.n. biopolimero, ĥemie viciĝas al polisaĥaridoj. Pura celulozo ne estas raraĵo en la naturo - ni rememoru kotonon, valoran krudmaterialon por tekstila industrio; sed celulozon por ĥemia industrio oni en grandega kvanto devas fabriki el malpli puraj materialoj. Ĥemiistoj fabrikas el celulozo precipe paperon, sed kiu ne estas imagebla la nuntempa kulturo, sed estu plu nomataj ankoraŭ almenaŭ **viskoza** kaj "**kupra**" **silkoj** (rajonoj) kaj kelkaj **celulozaj plasto**j - acetilcelulozo, celofano, celuloideo, ktp.

La pura celulozo estas sen ajna higiena danĝero, ja diversforma celulozo estas konsistaĵo de kelkaj klasikaj bandaĝaj materialoj. Simile estas fiziologie senefikaj la industriaj celulozaj produktoj kiel viskoza rajono, celofano, acetilcelulozo, celuloideo, k.s. Paperaj produktoj ankaŭ ne minacas la homan organismon, krom kelkaj teĥnikaj specialaĵoj intence impregnitaj per toksaj substancoj. El la higiena vidpunkto ĝenas la produktado de la menciitaj fabrikaĵoj. La **teĥnika celulozo** estas fabrikata precipe per t.n. **sulfita** kaj **sulfata procedoj**, la unua povas malpurigi la atmosferon per **sulfata dioksido**, la dua per malbonodoraj kaj toksaj **tioloj** (= merkaptanoj). Sed la

plej danĝeraj estas malnovaj **celulozo-farejoj** kaj maroj. Nome la teĥnika celulozo estas fabrikata precipe el ligno, kiu enhavas, krom celulozo, pli ol 50% de aliaj substancoj - saĥaridojn, rezinojn kaj precipe ligninon. La esenca celo de la celulozaj teĥnologioj estas malkombini kaj solvi tiujn akompanajn substancojn, t.e. liberigi pli-malpli puran celulozon. Se la solvaĵo de tiuj akompanaj substancoj estas ellasita en riveron, tiu lasta povas transformiĝi en putrantan malpuran kloakon, kies "akvo" vere taŭgas por neniu celo.

2. Kelkaj helpaj ĥemiaĵoj

Solvenzoj estas en la nuntempa industria socio grava kaj vasta grupo de ĥemiaĵoj uzataj grandskale en diversaj teĥnologioj por solvado, eluado, ekstraktado k.s.. La plej universala solvenzo estas akvo, kiu per si mem estas sendanĝera, eĉ necesa, por la homa sano. Ĉi-direkte ni devas studi alian grupon de ĥemiaĵoj multe pli konsiderindaj al la higiena vidpunkto. Temas pri la **organikaj solvenzoj**, kiuj plejparte estas diversaj **hidrokarbonoj kaj tiea klorizitaj darivaĵoj**. Ni jam parolis pri ili en la artikolo pri nafto. Ki ankoraŭfoje emfazu, ke ĉiuj likvaj hidrokarbonoj estas pli-malpli **toksaj** kaj kun **narkotaj efikoj**. Krome kelkaj havas ankoraŭ aliajn danĝerajn ecojn, ekz. benzeno difektas hematopoezon kaj estas kancero-estiga, klorizitaj hidrokarbonoj povas difekti vicon da organoj, precipe hepton, centran nervan sistemon k.a., krome povas esti kancerogenaj. Al la grupo de organikaj solvenzoj apartenas ankaŭ **alkoholoj**, pri kies tokseco ĉi-loke ne necesas longe paroli (eksterordinare venena estas metanolo!), **ketonoj**, **eteroj** kaj **esteroj**, plejparte da ili ankaŭ kun toksaj efikoj.

Surfacaktivaĵoj estas ĥemiaĵoj, kiuj efikas sur la surfacan tension en la fazo limo (ili malintensigas la surfacan tension). Pro ĉi tiu eco ili estas vaste uzataj por faciligi lavadon, sengrasigadon (de surfacoj), purigadon kaj multajn teĥnologiajn procedojn. Nia "intima konatulo" - sapo - apartenas ankaŭ al la surfacaktivaĵoj, sed el la vivomedia vidpunkto nin pli interesas diversaj **plene sinteziaj "sapsurogatoj"**, kiuj estas **malfacile biologia malkombineblaj** en la naturo kaj krome kelkaj el ili ankaŭ **toksaj**. Temas ekz. pri saloj de alkilsulfonoj, alkilbenzensulfonoj kaj 2-alkenilsulfonoj, sulfatoj de plurkarbonaj alkoholoj k.s. (t.n. anjonaj surfacaktivaĵoj), kvaternaraj amoniaj kaj piridiniaj saloj (katjonaj), alkilpoliglikoleteroj, acilpoliglikolesteroj, alkilfenolpoliglikoleteroj (nejonaj). Pro la bona lavefiko estas, eĉ tro abunde, uzataj ankaŭ polifosfatoj, kiuj povas kaŭzi **eŭtrofigon** de riveroj kaj lagoj, simile kiel fosforaj sterkaĵoj.

Iom specialan grupon de halogenizitaj hidrokarbonoj prezentas gasoj uzataj por la **transportado de malvarmo** en diversaj malvarmigaj kaj flostigaj aparatoj, ĉu hejme aŭ en industrio, kaj kiel **pelgasoj** en diversaj aerosolaj ŝprucigiloj (por farbado, desinfektado, kosmetikaĵoj k.s.). El aliaj multaj komercaj nomoj la plej ofta estas "freonoj". Temas plej ofte pri **klorfluorderivaĵoj**, malpli oftaj bromfluorderivaĵoj aŭ bromklorfluorderivaĵoj, de **metano aŭ de etano**. Oni jam ne kredos ilian absolutan fiziologian senefikecon; multaj el ili havas **narkotajn** kaj iritajn **efikojn**, kelkaj eĉ pli gravan toksecon. Krome ili povas penetradigi ĝis la stratosfero kaj tia, helpataj ĉe ultraviola radiado, **malkombinas ozonon**. Tio povus grave endanĝerigi la vivon sur la Terglobo, ĉar la ozona tavolo estas efika ŝirmilo kontraŭ la troa radiado kun la ondolongo sub 300 nm danĝera por vivaj ĉeloj.

3. Eblaj solvoj de problemoj.

Jam multajn jarojn ĥemiistoj emas almenaŭ parte prilabori la forfalantajn likvaĵojn post la celuloza teĥnologio. Feroentablaj saĥaridoj estas uzataj por la fabrikado de etanolo kaj de proteinoj por la nutrado de brutaro. Pentozo servas kiel krudaĵo per 2-furaldehido. Densigita lignina solvaĵo, pro sia „glueco", estas ankaŭ plurdirekte aplikata (alĝustigado de ŝoseoj, produktado de karbaj briketoj, aldonado al sterkoj ktp. ktp.). Sed la plej konvena vojo estas transiro al la modernaj procedoj kun **fermitaj teĥnologiaj cikloj**, sen forfalaĵoj. La sulfitaj teĥnologioj forlasas la "klasikajn" kalkajn salojn uzante estonte precipe la amoniajn kaj magneziajn kombinaĵojn - tiam oni forbruligas la **organikan konsistaĵon** de la forfalaj likvaĵoj ricevante energion kaj la postrestantajn


alkalojn reuzante en la teĥnologio. Simile procedas modernaj sulfataj teĥnologioj. La modernaj plurŝtupaj **sedimentaj kaj filtraj aparatoj** por la kaptado de forfluintaj celulozaj fibroj estas memkomprenebla postulo. La uzitan, forfalan, paperon oni redonu al la paper-farejoj - tio estas la plej "ekologia" solvo.

Kio temas pri la **organikaj solvenzoj**, oni certe devos forigi el la praktiko la alte danĝerajn ĥemiaĵojn, ekz. benzenon, metanolon, tetraklormetanon k.s.. En la industrio uzi perfekte hermetajn aparatojn, en la hejma mastrumado minimumigi la uzon de ĉi tiuj ĥemiaĵoj nur al la relative sendanĝeraj substancoj.

En la sfero de la sinteziaj surfacaktivaĵoj ni atendas de la esploristoj evoluigadon de novaj surface aktivaj ĥemiaĵoj, kies strukturo ebligos ilian facilan biologian malkombinadon en la naturo, krome tiuj substancoj devos esti netoksaj. Tia vojo jam estis ekpaŝita. Tamen oni ĉiam devos atenti certan danĝeron de tiuj ĥemiaĵoj, ekz. intensan sengrasigadon de haŭto k.s. kaj tial uzi konvenajn protektajn rimedojn. La "ĥemia lavado" estas preskaŭ moderna malsano dum la lastaj jaroj; ni estonte ne forgesadu, ke ekzistas ankaŭ neĥemiaj procedoj por purigado, lavado ktp.. El la plej modernaj mi menciu almenaŭ **ultrasonon**. Oni devos minimumigi la enhavon de fosfatoj, resp. anstataŭigi ilin per malpli danĝeraj konsistaĵoj, en lavaj sistemoj. Ĝenerale oni devos trovi kompromison inter la lavefiko de ĥemiaĵoj kaj la ekologiaj postuloj.

Fine al la afero de "freonoj" kaj pelgasoj: ne nur la malvarmigiloj (aŭ frostigiloj) devas esti perfekte hermetaj, sed oni devas ankaŭ sufiĉe zorgi, ke la gasoj ne liberiĝu en la ĉirkaŭaĵon dum la riparoj de la malvarmigaj aparatoj. Koncerne la ŝprucigiloj, kiuj uzas la ĉirkaŭan aeron por peli likvaĵojn. Jam ekzistas viceto da firmaoj, kiuj komprenis la urĝecon de la afero kaj komencis fabriki tiajn ilojn.

Malkombineblo se surfactivaĵoj en la rivera akvo (diesteroj de sulfobutandiacido)



Informoj

D-ro Balász Szemök, H-2737 Ceglédbercel, Pozsonyi út 2.

LA STOMATOLOGIO EN LA MEDICINO

Raporto nur pri la hungaraj rilatoj

Inter la patrujokupado kaj la akcepto de la bapteco estis ankaŭ dentmalsanuloj. Unu persono havis meznombro 2-3 forigitajn dentojn. Estas nekonate, kiuj eltiris la dentojn. Miaopinie estis ŝamanoj (sorĉistoj - pastroj - paganoj), kiuj kuracis ankaŭ aliajn malsanulojn. Do, la prestiĝo tiam estis la plej alta en la historio de la hungara stomatologio.

Post la baptiĝo la gardosanktulinoj de la dentmalsanuloj estis en mez-Eŭropo la Turingia Sankta Elizabeto, en okcidenta-Eŭropo Sankta Apolonia. La kuracadon faris la monaĥoj. Bedaŭrinde la koncilio en la jaro 1278 malpermesis al la pastroj la faradon de la sangaj operacioj. La nivelo abrupta malaltiĝis, la kuracistoj kredis la kirurgian operacion malinda, ili kuracis per dekoktaĵoj.

En la 17-a jarcento aperis la unua kuraclibro; ĝi skribis, prefere pri la prevento kaj ĝi rekomendas 58 kuracmanierojn kontraŭ la dentdoloro. La plimulto estas superstiĉo aŭ placebo. La libro ne parolas pri la protetiko aŭ dentoforigo, ĉar la faktan stomatologian faris membroj de la kirurgia gildo, kiuj ne komprenis latine. La gildoj funkciis tiel, kiel la aliaj, sed ili estis la lastaj laŭrange. En la 17-a jarcento la kirurgio kaj la barbira metio disiĝis. La rango de la kirurgoj estis plej alte taksata. Oni povas trovi stomatologiajn indikojn en verkoj de eminentaj verkistoj.

La nova stomatologia epoko komenciĝas nur an la 18-a jarcento. Tiam funkciis aparte internistokaj kirurgo-dentistoj. La internistoj havis pli grandan prestiĝon, kaj la kirurgoj laboris pli efike (la vundo iom post iom resaniĝas).

La protetiko naskiĝis en Francio. La protezoj estis tre multkostaj. La riĉuloj povis pagi tiujn protezojn. La protetiko apartenis al la artoj, dume en la vilaĝoj prosperis la superstiĉo. La hungaraj kuracistoj transprenis la kuracmetodojn de la konservanta stomatologio (endodontio) laŭ la praktikantaj manieroj de la "VIENA SKOLO". Ili akceptis, ke anstataŭ la ĉarlatanaĵoj oni devas fari kaŭzan terapion.

Oni enkondukis la oran plombon. La orodento fariĝas ŝtatsimbolo, kial la metaldento (ŝtalkrono) en la ciganaj familioj post la liberigo (1945).

En la jaro 1779 la universitato de la urbo MAGYSZAMBAT kompletiĝis per kuracista kaj kirurgia fakultatoj. Do ankaŭ en Hungario estis eble, ke la t.n. moderna medicino povis disvastiĝi. Intertempe oni translokigis la universitaton al PEST, kie unuafoje en la jaro 1800 oni donis dentistmajstran diplomon por tri personoj.

La unuan hungaran stomatologian instituton oni malfermis en la jaro 1844, kaj estis estrata de la universitata profesoro Nedelko Döme. La nomo kaj la jaro estis mejloŝtono en la egalrajteco de la hungara dentkuracado.

La „HUNGARIAN SKOLON" fondis ISZLAI József kaj ÁRKÖVI József. ISZLAI en la jaro 1903 ricevis katedron, sed li mortis post unu jaro kaj la katedron oni likvidis. Li fondis la unuan fakan asocion.

ÁRKÖVI fariĝis profesoro de la Universitata Dentista Instituto en la jaro 1890, kiu en la jaro 1909

ricevis novan domon, kie nun funkcias la oralkirurgia kliniko. La unuaj fakdentkuracistoj ekzameniĝis en la jaro 1919. La emancipado ŝajne realiĝis. Oni edukas prestiĝajn dentistojn, kiuj havas eksterlande ankaŭ postenon. Tion ĉi pruvis niaj laborantaj fakuloj en la eksterlando.

Antaŭe, en la jaro 1901 grandnombraj dentoteknikistoj ekzameniĝis kaj ricevis la permesilon kuraci senpere (rekte) la pacienton. (Laŭ komuna dentista lingvo "labori en la buŝo"). La avantaĝo estis, ke FRANCESKO Józefo (reĝo) nomumis unu el la dentoteknikistoj-dentkuracisto. Sekvis skandalo, la reĝo retiris la doktoran titolon, kion rajtis doni nur la universitato por tiuj, kiuj finis siajn studjarojn. Tiu ĉi kolego poste laboris kiel nediplomita dentisto. Estas evidente, ke la aliaj dentoteknikistoj ankaŭ volis kuraci pacientojn, kaj laboris malmulte da stomatologoj, tial la ministro permesis al ili ekzameniĝi post kelksemajna lernado. La prestiĝo de la fako denove malaltiĝis.

Post la liberigo la farindaĵoj multobliĝis, kreskado de nombro da ekzameniĝintaj dentistoj, ne estis irebla vojo. Laŭ la eksterlandaj ekzemploj oni kreis apartan "Stomatologisciecan Fakultaton".

El la Stomatologia Kliniko fondiĝis kvar novaj katedroj. La ĉi tieaj studentoj fariĝas plenrajtaj dentkuracistoj, sed neplenrajtaj generalaj kuracistoj. Komence estis konfliktoj inter la malnovaj "med.univ." dentkuracistoj kaj la novaj "med.dent." dentkuracistoj. Sed la tempo pruvis, ke la novaj dentkuracistoj bone povas plenumi siajn taskojn, ne nur en la stomatologio, sed ankaŭ en la teoriaj institutoj, kiel esploristoj. Hodiaŭ ni jam havas du katedroestrajn profesorojn, eĉ profesoron pri fiziologio.

Elformiĝis nova branĉo de la medicino. La apartigo okazis. En la urbaj poliklinikoj eble ni ne tro malproksimiĝis, sed niaj dentkuracistoj en la vilaĝoj ĝenerale laboris solaj en provizoraj ejoj.

Baldaŭ evidentiĝis, ke la medicino estas unu kaj ne tute dividebla. Oni plifaciligis la reintegradon, ĉar en la komunumoj la centraj konsultejoj unu post la alia aperis. La laboron kuntenas grupestraj kolegoj elformiĝas laborgrupoj. Aperas la regionaj oralkirurgoj; antaŭe ankaŭ ili estis stomatologoj. Ili estas la ĉeneroj inter la hospitalo kaj dentkuracisto.

Klarigo:

Patrujokupado okazis en la jaro 896 = la nuna Hungario. Akcepto de la bapteco estis la samsignifa akcepto de la kristanismo en la jaro 1000.

referaĵoj

Pecigado de galŝtonoj per puŝondo.(Chirurgiache Prazis,37,2;2T5-276 1987).

Simile kiel ĉe renŝtonoj estas provata pecigado de galŝtonoj per puŝondo. Dum 60-120 minutoj estas aplikataj 600-1500 puŝoj. El 152 malsanuloj zorgema elektitaj (maksimume 3 galŝtonoj pli malgrandan ol 25 mm, funkcia galveziko, kapablo subiĝi je narkozo (estis efiko nur ĉe 41 = 27%). En tiuj kazoj oni sukcesis dispecigi ŝtonojn ĝis je sableroj kaj fragmentoj malpli grandaj ol 8 mm. Ĉe 6 pacientoj la galveziko mem puriĝis dum 25 semajnoj. Nur du sentis malgrandajn dolorojn ĉirkaŭ la galveziko, unu malgrava pankreatito estis kuracita per endoskopia sfinkterotomio kaj eltiro de du fragmentoj. Pli gravaj apudaj efikoj ne estis observataj.

MORBUS CROHS kaj gravedeco. (Ghirurgische Praxis 37,1*.46,1987).

Fertileco de virinoj kun M.CROHN estas signife malaltigita. Nombro da infertulinoj atingas 30-50%. Trairon de gravedeco M.CROHN ne influas. Kvankam ĉe 40% da kazoj post nasko okazas recidivo de la malsano, ĝia trauro estas pliparte milda kaj bone regebla. Kiel kuracan medikamenton oni povas elekti SULPASALAZINon event. 5-p-Aminosalicilan acidon, ĉe pli gravaj kazoj

metilprednosolon-on. Se oni konstatas gravajn signojn de stenozo de maldika intesto aŭ subileuson, oni rekomendas ne gravidigi. Sed ĝenerale M.CROHN ne estas kontraŭindikita por gravedeco.

Interferono kaj citostazo. (Documenta Giba-Geigy,3:5,1987).

De la malkovro de interferono pasis jam preskaŭ 30 jaroj. Tamen ĝian praktikan uzon baris precipe malfacileco izoli ĝin kiel sufiĉe puran substancon. Malkovro de genoteknikaj metodoj ebligas nun produkton de puraj interferonoj kaj montriĝis, ke ĉe kontraŭtumora efiko partoprenas vico da diversaj elementoj. Dum laboratoriaj provoj montriĝis, ke kombinaĵo de interferono plus konvena citostatiko malgrandigas sesfoje pli la tumoron, ol citostatiko sola. En praktiko tio signifus, ke oni povus atingi saman efikon eĉ dum uzo de pli malgrandaj dozoj de citostatikoj, kaj tio signifas pli bonan tolereblon kaj pli malgrandan kvanton da kromefikoj.

Sepsa paciento. (Helvetica chirurgica acta,54,1/2; 15-24,1987).

Ĉe pli ol 90% de kirurgiaj sepsoj oni trovas fokuson en abdomena kavon: Temas precipe pri peritoneito kaj intra- aŭ retro- peritoneaj eventuale visceraj abscesoj. Klinika kaj terapia koncepto bazas sur eligo de la fonto de sepsa per kirurgia aŭ alia maniero. Loka intraperitonea apliko de antibiotikoj kaj antiseptikoj ŝajnas ne esti sufiĉe science bazita. Mekanika efiko per tralavado estas okulvide pli grava kaj efika, permanenta postoperacia tralavado eĉ ĉe fermita abdomeno efektive prezentas certan progreson, tamen ankaŭ multajn riskojn kaj limigitan efikon. Operacio ankaŭ ne povas garantii ĉiukaze sukceson. Ĉe iuj pacientoj restos sepsa por certa tempo limigita en abdomenan kavon, ĉe aliaj ĝi prezentiĝas dum mallonga tempo kiel bildo de multloka organa kaj sistema malsufiĉeco.

Hipertensio ĉe junaj virinoj. (British Medical Journal, 294,1057, 1987).

Junaj virinoj kuracitaj pro hipertensio devus ĉiam esti demandataj pri tio, ĉu ili samtempe uzas antikoncipajn tablojdojn. Tiudirekta studlaboro prezentis 34 virinojn-hipertensulinojn en la aĝo de 15 ĝis 44 jaroj, el kiuj 11 dum la hospitaliza periodo uzis antikonceptivojn. Ĉe 6 el ili la sangotensio estis komence de tiu terapio normala. La plej ofte uzataj antikonceptivoj enhavis 50 mikrogramojn da estrogeno, tamen la sangotensio kreskis eĉ post 20 mikrogramoj, Post ĉeso de uzado de tablojdoj neniu plu el ili havis normalan tension.

Nutrado kaj karcinomo. (Ernährungsforschung, 32:3,36-38, 1987).

Dum lastaj jaroj ripete aperis opinioj, ke la faktoro de nutrado kaj manĝokutimoj ludas certan rolon en patogenezo de malignaj tumoroj, precipe ĉe ilia gastrointesta lokiĝo. Rilatoj inter sanstato kaj malsano sur unu flanko kaj nutrado sur alia flanko estas bone konataj, tamen por ĉiuj malsanoj ili ne estas detale analizitaj. Se temas pri t.n. tumora dieto, oni devas diri, ke ekzistas neniu formo de la dieto, kiu povus prevente aŭ terapie priinflui tumoran aktivecon. Raciaj estas nur postuloj pri fiziologie bone balancita nutraĵo kun sufiĉa alkonduko de vitaminoj kun reduko de animalaj grasoj kaj nesaturigitaj grasaj acidoj kaj kun sufiĉe enhavo de balastaj substancoj en la nutraĵo.

Alkonduko de albuminoj dum gravedeco. (Ernährungsforschung,32,4: 117/1205,1987).

Eĉ se hodiaŭ oni ne dubas pri tio, ĉu nutraĵo ludas gravan rolon en tiu ĉi periodo por sanstato de patrino kaj infano, estas en unuopa kazo tre malfacile specifi patologan efikon de malbona, nesufiĉa aŭ tro abunda alkonduko de nutraĵo al la gravedulinoj. Patrino nutraĵo antaŭ gravedeco kaj dum ĝi devas esti tiom sufiĉa, ke ĝi certigu sufiĉan korpopezon de la feto. Kvankam estas konata tuta vico da rekomenditaj dietoj por gravedulinoj, ili havas nur orientan signifon. Kuracista konsilo tiudirekta event. aplikado de kiu ajn substitua nutrado kaj similaj aranĝoj valoras nur en konkreta individua situacio.

Lakto kaj denta kario: (Selecta, 29,23:149,1987)

Abunda konsumo de dolĉaĵoj kaŭzas ŝanĝon de koncentreco de hidrogeniaj jonoj kaj ilian transferon en acidecon kun kariogena efiko. Sakaro kaj el ĝi estiĝantaj acidoj demineraligas denton

kaj subtenas en ĝi bakterian kolonigon. Por kariogena efiko ne gravas nur enhavo de sakaro. Kiel natura antaŭŝirmo de dentoj efikas lakto, kies favora efiko kontraŭ denta kario dependas de ĝia graseco. La plej efika rimedo estas sekve plengrasa lakto, ĉe tiel nomita sengrasita lakto estas tiu efiko signife pli malgranda. Antaŭ ŝirma efiko de lakto por dentoj estas klarigita tiel, ke laktaj albuminoj blokas kariogenajn acidojn en ilia efiko. En neŭtraliĝo de tiuj acidoj partoprenas ankaŭ grasoj kaj mineraloj. Tiel laŭ tiu vidpunkto precipe efikas kondensita lakto kun granda parto de grasoj, albuminoj kaj mineraloj.

Antaŭnaska kontrolo de infano. (Zeitschrift für Ärztliche Fortbildung, 81,15:751-756,1987).

Sukceso de ultrasono antaŭnaska esploro de la infano manifestiĝas per granda malaltigo de apero de mortnaskitaj infanoj, sed ankaŭ kreskanta parto de novnaskitoj de etendata vivokvalito. Sen subtakso de signifo de aliaj esplormetodoj tiurilataj, estiĝis decidaj antaŭ ĉio ultrasono kaj kardiografio. Ultrasonografio ebligas fidiinde taksi gravedaĝon, fetan kreskon, pezon kaj diagnozi nombron da fetoj, lokigon kaj maturecon de placentoj, anomaliajn de fetoj, fetan kaj uteroplacentan perfuzon kaj trairon de fetaj movoj. Oni povas gajni tre valorajn ekkonojn per esploro de feta sango kaj amniocentezo.

Nuntempa situacio de narkomanio en Francio. (Selekta, 29,4:3,1987)

Laŭ ekspertoj oni povas supozi, ke 8% de gimnazianoj staras "per unu piedo" sur droga scenejo: fumi ili komencas en tre malalta aĝo, alkoholon ili drinkas "ĝis falo", multigas uzado de psikoaktivaj substancoj kaj proviĝas ankaŭ drogoj. Alkoholo funkcias en tiu malgaja ŝtupareto kiel komenca stacio. Se temas pri psikotropaj medikamentoj, uzas ĝin pli knabinoj ol knaboj. Receptojn por tiaj farmakoj skribas pliparte praktikaj kuracistoj. Parto da gejunuloj priminacitaj per narkomanio havas depresian tendencon, dua parto diferenciĝas de ili per sia ekstera konduto. Komparo de unuopaj tiudirektaj studoj konfirmis, ke la junaj unuopuloj tendencas por narkomanio precipe tiam, kiam kontribuas por tio iliaj sociologiaj, resp. familiaj rilatoj.

Karcinomo de stomako kaj gravedeco. (Zentralblatt für Gynäkologie 109,15:974-978, 1987).

Nuntempa apero de gravedeco plus karcinomo de tia lokiĝo estas tre rara, tamen okazas tio nur tial, ĉar karcinomo de stomako estas supozata kutime en pli aĝaj virinoj. Estas cititaj kazuistikoj de du tiaj malsanulinoj gravedaj, ĉe kiuj la karcinomo estis diagnozita malfrue. En la unua kazo temis pri klinike netipa bildo, en la dua estis bildo de tiu maligna malsano kovrita per fiziologiaj ŝanĝoj de semtempa gravedeco. Dume ambaŭ novnaskitoj travivis malsanon de patrinoj post spontana nasko, ambaŭ patrinoj mortis mallonge post nasko.

Droga situacio en Aŭstrujo. (Selecta, 29,24:8, 1987)

Tiu lando estas sola en okcidenta Eŭropo, kie droga krimeco ne havas kreskantan tendencon. Kvankam laŭ oficialaj raportoj altiĝis konsumado de koksino, konsumado de aliaj drogoj kaj la nombro da krimoj de narkomanoj malaltiĝis. En la jaro 1986 estis juĝitaj 795 gravaj krimoj kontraŭ la leĝo pri drogoj - tio estas je 240 malpli ol en la antaŭa jaro. Pro narkomanio mortis 46 unuopuloj. Aŭstra ministro por internaj aferoj tamen ne vidas nuntempan situacion tiom favora kaj opinias ebla, ke tiu ĉi pozitiva bilanco povas bazi sur rafinitaj maĥinacioj en la nigra merkato de narkotaĵoj. Tamen certas, ke junaj homoj havas pli malgrandan intereson pri drogoj ol pli frue. La droga scenejo fakte maljuniĝas kaj la specialistoj esperas, ke tendenco daŭros plu.

Gravedeco kaj diabeto. Medizin aktuell, 13,9:414-415, 1987.

Temas pri risko kaj por infano kaj por patrino, kiun oni povas malaltigi nur per orientiĝo al "planita gravedeco", plue per zorgema observado dum gravedeco, nasko kaj puerperio kaj kvalita zorgo pri la novnaskito. Supozo por ĉiuj tiuj aranĝoj estas bona kunlaboro de la graveda diabetulino. La problemoj de planita gravedeco devus esti pridiskutitaj kun diabetulinoj jam en la aĝo de iliaj 15 jaroj. Principe oni povas diri, ke laŭ genetica vidpunkto baras nenio gravedecon. Danĝero de hereda trafo per diabeto de unua tipo, se malsanas nur unu el gepatroj, estas tre malgranda kaj estas taksata

al 3 ĝis 5%. Tamen necesas konstati, ke labila diabeto povas gvidi al gravaj gravedaj komplikaĵoj kaj al altigita nombro de fetaj anomalioj. Ĉiujn tiajn difektojn oni povas bari per perfekta observado de la gravedeco. Ĉiu gravedeco signifas por la patrino kroman priŝarĝon metabolisman. Ek de la 32. semajno de gravedeco, ĉe labila diabeto multe pli frue ĉiu graveda diabetulino devus esti hospitaligita en akuŝejo, kie devus esti tuj fiksita laŭ trajto de gravedeco. Funkcia kapablo de placentoj kaj certaj parametroj de la feto, konvena termino de la nasko, dum kio oni devus klopodi pri akuŝo per vagina vojo. Ĉiuj novnaskitoj de diabetulinoj devus esti lokigitaj en neonata sekcio de intensiva flego. Montriĝas, ke per intensiva taĉmenta kunlaboro oni povas bari kaj gravajn komplikaĵojn de gravedeco kaj difektojn de novnaskitoj.

Hamartomoj en koro. (Münchener medizinische Wochenschrift, 129,15: 15,1987).

Hamartomo estas tumorsimila hista dislokiĝinta fendaĵo. Kvankam ili estas mikroskopie malgrandaj, ili povas elvoki la vivon priminacantan taĥikardion kaj ĉe novnaskitoj kaŭzi eĉ morton. Dro D. Kearny en Houston-o, Usono, priskribis kolekton da pacientoj kun gravaj disritmioj. Histologie pruvigis, ke temis pri hamartomoj, kiuj rezultis pro falsa embria evoluo kaj per sia lokiĝo en koro provokis koran disritmion. Kvankam en la scienca literaturo estis publikigitaj nur kelkaj tiaj kazoj de kora malsano, Dro Kearny kredas, ke hamartomoj de la kormuskolo estas pli oftaj kaj eskapas antaŭ la atento de patoloĝoj. Sed tiaj kazoj povus klarigi kelkajn mortojn de suĉinfanoj kaj pli grandaj infanoj.

Nobelpremio 1987.

La premiito estiĝis (por medicina esploro) 48-jara japana biologo Susumu Tonegawa, laboranta en la Instituto de teknologio en amerika Cambridge-o. Li ricevis la premion por eksterordinare grava instiga kaj pionira laboro dum studo de genetikaj variigeblecoj de antigenoj. Li klarigis, kial la homa organismo kapablas krei milionojn da specifaj antigenoj, ĉar ĝia potencialo faras nur eble 100 mil genojn. Tonegawa per siaj laboroj pruvis, ke la hereda homa materialo ne estas iu precize ordigita arkivo, sed ke ĝi povas ankaŭ dum la vivo ŝanĝiĝi.

Interrupcio en GDR. (Ärztliche Praxis, 39,47:1561,1987)

Laŭ la sciigoj de la medicina gazetaro altiĝis ĉe pli junaj knabinoj ol 16 jaroj en GDR la nombro da tiuj, kiuj postulas interrupcion. La situacio estas taksata tre grave, ĉar ankaŭ ĉe primiparoj laŭ anamnezo estas konstatita unu aŭ pluraj interrupcioj. Klarigo bazas en tio, ke tiuj knabinoj ĝia nun dediĉis nur malgrandan atenton al la antikoncepcio. Montriĝis nome, ke 50% de junaj homoj uzas dum seksa kontakto neniun ŝirmilon.

Imunoglobulino ĉe inflamo de dika intesto. (Medikament und Meinung 10,10:9,1987)

Imunoglobulino el homa sango bone pruvigis dum kuracado de pacientoj kaj eksterordinare malfacila inflamo de dika intesto. En la kliniko de Mannheim-Heidelberg estis atingita grava pliboniĝo de simptomoj de Crohn-a malsano kaj ulkusa inflamo de la dika intesto ĉe pacientoj, kiuj ne reagis kontraŭ normalaj kuracmetodoj. Pliboniĝo montriĝis post apliko de sangaj derivaĵoj eĉ ĉe gravaj sangumadoj de la intesto, dum gravaj febroj kaj doloroj, kiuj akompanas la menciitajn malsanojn.

Akuta pneŭmonito. (Sovetskaja medicina, 2: 70-71, 1987)

Eĉ hodiaŭ ne perdis tiu malsano sian signifon, precipe en kelkaj regionoj de Sovetunio, kie ĝia frekvenco estas taksata ja 100-120 kazoj inter 100 mil loĝantoj. Estas citita sumo de 90 malsanuloj, kiuj estis detale mikrobiologie esploritaj dum veno al hospitalizo. Poste ili estis tiamaniere observataj dum 2-3 semajnoj. El kaŭzaj patogenoj de tiu malsano estis plej ofte izolita STREPTOCOCCUS PNEUMONIAE, kiu estis kaŭzanto de akuta pneŭmonito preskaŭ ĉe duono de ĉiuj kazoj. Sekvis STAPHYLOCOCCUS Pyogenes kaj HAEMOPHILLUS INFLUENZAE. Ĉe 80% de pacientoj, ĉe kiuj estis el kulturita STREPTOCOCCUS PNEUMONIAE en monokulturo, estis la

akuta trauro de la malsano komplikita per gravaj signoj de toksigo. Ĉe malsanuloj, kie temis pri miksita kulturo estis trauro de la malsano ĝenerale pli milda. Tiu mikrobiologia esploro havas sian validecon en tio, ke ili permesas konstati etiologian diagnozon de la malsano dum relative mallonga tempo kaj ebligas tiel la celitan kuracadon de la pneŭmonito jam dum la unuaj tagoj de la hospitala restado.

Ni fondis esperantan klubon ĉe kirurgia sekcio - malsanulejo Nový Bydžov, ĈSSR. Tutmonde ni serĉas gekorespondantojn. Kiu volas korespondi kun junaj belaj flegistinoj kaj unu ĉarma kuracisto, bonvolu kuraĝe skribi al ni, VI povas skribi kolektive aŭ unuope. Adreso de kursgvidanto: Josef PETERA, 503 52 SKŘIVANY 44, Ĉeĥoslovakio.

Suĉnutrado kaj dormo. Medizin Aktuella, 13,2;89.1987

Estas bone konate, ke suĉinfanoj post suĉnutrado falas en profundan dormon. Tiu fakto tamen ne estas iu eksterordinara psikologia fenomeno. Nome estis konstatite, ke la patrino lakto enhavas tre efikajn dormorimedojn, inter kiuj apartenas antaŭ ĉio en alta koncentriĝo ĉeestanta t.n. „delta-sleep-inducing”peptido. Nomo de tiu ĉi peptido havas rilaton al delta-ondoj de elektroencefalogramo kaj signifas profundan kaj refreŝigan dormon. La enhavo de la citita substanco estas en patrino lakto signife pli alta ol en bovino lakto. Tiu ĉi komplika peptido estis izolita kaj montriĝis, ke ĝia indika vasteco estas pli vasta, ĉar ĝia efiko estis konstatita ankaŭ en grupo de respiraj farmaciaĵoj. En eksperimento ĉe volontuloj pruviĝis, ke ĉi tiu peptido kaŭzis plibonigon de efikeco, se temis pri testo de atentemo. Konstatita estis ankaŭ sento de bona memkonscio kaj fleksibileco de neŭrozuloj, ĉe kiuj okazis pli bona rego de angoro aŭ alia ŝarĝo.

El Svisujo: Medikamento por senebriĝo. ZN’ 50/87

En farmacia koncerno Hoffmann - La Reche en Baselo estis inventita medikamento signita RO 4513. Post ĝia apliko senebriĝas eĉ homo, kiu trinkis ajn kvanton da alkoholo. Sed ĝi havas malavantaĝon: al la paciento estas malpermesite daŭrigi drinkadon, ĉar tio signifus lian morton. Ĉar ĉiuj alkoholuloj estas ĥarakterizataj per malforta volo, la preparaĵo ne venos en ĝeneralan komercon.

HUMURAĴOJ

Saĝaĵoj kaj eldiroj pri kuracistoj kaj pacientoj:

Voltaire: "Kuracistoj estas homoj, kiuj preskribas medikamentojn, pri kiuj ili scias nur malmulton, al homoj, pri kies sanstato ili scias nenion".

Ludoviko la XIVa: "Doktorojn ni devas taksi kun iom da humoro“.

Avicena: "Per unu mano la homo ne plu aplaŭdos".

Spinoza: "Ne nur unu homo konservis sian bonstaton kaj ĝojon nur dank'al konsiloj, kiujn li ne respektis".

N.V.Gogol: "Dio mia! Ridu pli ofte! Rido estas sola fidinda medikamento kontraŭ ĉiuj doloroj".

"Mi opinias, ke mia edzo longe restos en hospitalo".

"Ĉu vi parolis kun lia doktoro?"

"Ne, sed mi vidis lian flegistinon".

Ĉesky esperantský svaz, 110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY, Dohlédací pošta Praha 07, Snížený poštovní poplatek povolen Ředitelstvem pošt Praha
J.ZN. P/1-1267/79 ze dne 6.4.1979